Entre els membres del col·lectiu esperantista que foren objecte directe de la repressió, és a dir que foren occits per la barbàrie, cal esmentar els següents: Joan Matas Soler, sastre de professió, i Josep Salom Nadal<sup>7</sup>, mestre d'obres. També, Antoni Coll Sastre, industrial de l'alimentació; Sebastià Crespí Valls, delineant i funcionari de l'Ajuntament de Ciutat, que fou president de l'*Esperantista Klubo Palma*, fundà i dirigí *Lumo*; fou també membre fundador i president durant uns mesos de l'Agrupació de Palma de l'Esquerra Republicana Balear. El balanç es completa amb una quantitat gens menyspreable d'esperantistes mallorquins que foren empresonats o reclosos en camps de concentració, entre d'altres Antoni Nadal<sup>8</sup>, farmacèutic, i Gabriel Meneu Piña, funcionari de l'Ajuntament i durant un llarg període president o secretari de l'*Esperantista Klubo Palma*.

La repressió franquista es mostrà virulenta tant dins com fora de Mallorca; si més no, així ho va viure el col·lectiu esperan-

tista. A mesura que l'exèrcit rebel capturava territori, procedia a l'eliminació d'aquells habitants que s'havien significat o simpatitzaven amb valors liberals o democràtics; entre aquests fou assassinat bona part del col·lectiu esperantista<sup>9</sup>. Hi ha cert paral·lelisme entre el que va succeir a Mallorca i a l'àrea de Saragossa. En aquesta ciutat, en esclatar la rebel·lió militar, alguns professionals de l'exèrcit que dominaven la llengua internacional s'incorporaren a l'exèrcit rebel, mentre que els membres civils que participaven habitualment en les tasques dels clubs aragonesos es tancaren a casa. Foren trets dels seus domicilis i morts sense cap forma de judici a semblança del que va succeir a Mallorca. D'aquests esmentarem el president de l'associació saragossana José Carnicer, que fou occit per forces rebels el setembre del 1936<sup>10</sup>.

Val a dir que va haver-hi sensibles diferències en el tractament sofert per l'esperantisme a Mallorca en comparació amb el de Saragossa. A Palma la por i el temor féu que fossin els mateixos esperantistes els qui fessin desaparèixer arxius i documentació per considerar-ho altament comprometedor<sup>11</sup>. Contràriament, a la capital d'Aragó, la repressió es féu sobre les persones, de manera que el local social d'una de les entitats esperantistes, concretament *Fraterco* ("Fraternitat"), gràcies a la influència del comandant Ramon de Salas Bonal, restà obert, però sense cap mena d'activitat. De fet, aquesta fou l'única entitat esperantista de tot l'estat que continuà oberta després de la guerra: totes les altres desaparegueren. Amb tot, l'any 1941, una vintena de joves falangistes calaren foc a la biblioteca i als arxius i destruïren tot el mobiliari del local social. Naturalment, les autoritats del moment no feren res per impedir-ho.

L'opinió que tenia Franco del moviment esperantista no tenia res a envejar de la manifestada a l'Alemanya nazi, on fou especialment prohibit i perseguit<sup>12</sup>, juntament amb altres expressions de caire cultural. El setembre del 1937 des de *Radio Salamanca* atacaren el Govern de la Generalitat. L'acusaven de "jueu, maçó i bolxevic" perquè havia saludat el Congrés Internacional d'Esperanto que se celebrava a Varsòvia<sup>13</sup>. Qui fou coronel

de l'exèrcit franquista, Antonio Jiménez Mora, antic dinamitzador del moviment esperantista asturià, suggerí al mateix general Franco, després d'aconseguir superar les etapes pròpies que imposava la jerarquia de l'exèrcit colpista, l'ús de l'esperanto per a contrarestar la propaganda que feien els mitjans de comunicació fidels al govern de la República. Aquests es dirigien a l'estranger en esperanto, entre altres llengües, denunciant els bombardeigs indiscriminats contra la població civil, així com els crims que cometien les tropes franquistes a mesura que ocupaven terreny. La resposta es torbà en el temps i fou totalment negativa<sup>14</sup>.

En la zona fidel al govern de la República els membres del moviment esperantista s'abocaren en la defensa de la llibertat i la democràcia. La comunitat esperantista republicana, lluny de quedar-se tancada a casa va engegar una activitat frenètica. S'editaren múltiples periòdics en esperanto, la majoria de caràcter ideològic. A Catalunya n'editaren la CNT (*Informa Bulteno*, "Butlletí Informatiu"), el POUM (*Hispana Revolucio*, "Revolució Espanyola"), el PSUC (*Informoj pri Hispanio*, "Infomacions sobre Espanya", i *Unueco*, "Unitat"); el govern de la Generalitat també edità en esperanto els seus *Comunicats de Premsa* i al País Valencià el Partit Socialista edità *Popola Fronto* ("Front Popular"). En conjunt, no sols van emprar la llengua internacional per a denunciar l'agressió feixista com eren els bombardeigs en zones civils, sinó també per a donar a conèixer les característiques de la vida quotidiana en la rereguarda de la societat republicana. A més a més, la llengua internacional, va servir per a informar sobre les vicissituds en què es trobaven les Brigades Internacionals<sup>15</sup>.

Amb relació a les pèrdues sofertes pel moviment esperantista a conseqüència del cop d'estat frustrat que va comportar la guerra, no seria just ometre el fet que dins l'àrea republicana alguns preveres esperantistes van ser occits per elements contraris a la religió catòlica, els quals la percebien com a justificació i element indispensable del cop d'estat. El més conegut fou un extraordinari orador en esperanto, Joan Font i Giralt, dirigent de la Unió Universal de Catòlics Esperantistes

i director de la revista *Espero Katolika* ("Esperança Catòlica").

En acabar la guerra civil, les autoritats espanyoles imposaren l'ordre pel qual havien promogut la sedició i la guerra i, en termes generals, l'associacionisme va haver de moure's d'acord amb uns valors totalment contraposats als que fins llavors havia promogut la comunitat esperantista. En finalitzar la Segona Guerra Mundial foren molts els esperantistes que esperaven la caiguda del feixisme espanyol, però algunes potències occidentals ajudaren el franquisme i el règim continuà, si bé es va veure obligat a esmolar algunes arestes del seu programa. En definitiva, el feixisme espanyol va haver d'acceptar alguna consideració que provenia del món parlamentarista i liberal que tant i tant havia combatut. De manera que l'esperantisme es va poder beneficiar d'una nova política, de llavors d'ençà explícitament no fou prohibit, però sí que fou vigilat de molt a prop per les forces de seguretat.

L'any 1949, arran del primer curs d'esperanto celebrat a Saragossa després de la guerra, la policia – segurament encuriósida per l'interès que manifestaven els alumnes per l'esperanto – els visità a la matinada i els interrogà. La policia volia conèixer per què s'havien inscrit al curs, per què s'interessaven per aquella llengua i què tenien previst fer amb aquesta una vegada la poguessin emprar. El professor mateix, retornat de l'exili d'Algèria, fou víctima de les visites nocturnes<sup>16</sup>.

Les trobades i les activitats, així com el contingut de les conferències que pretenien fer els membres de la comunitat esperantista, havien de ser aprovades per les autoritats. En conseqüència, s'havia de presentar a la policia la traducció a l'espanyol de tot allò que es deia i es llegia, prèdiques eclesiàstiques incloses, a les trobades que s'organitzaven. D'aquestes normes no es va escapar ni la cerimònia de nocces que realitzaren un ciutadà francès i una catalana súbdita espanyola en el marc del congrés espanyol d'esperanto celebrat a Barcelona l'any 1956<sup>17</sup>.

Certament, derrotats el nazisme i el feixisme a Europa amb excepció dels estats ibèrics, amb el temps l'esperantisme es

reorganitzà seguint estructuralment les ordenances del règim i molt lluny dels valors cívics amb què havia funcionat durant la República. Així, en la dècada dels anys cinquanta, desapareguda totalment la Federació Catalana d'Esperantistes, de la qual formaven part les associacions tant de Palma com de Sóller, començà a funcionar la *Federación Esperantista Española*, de la qual foren membres destacats els mallorquins Bernat Rabassa<sup>18</sup>, Miquel Ribas de Pina – militars de l'exèrcit vencedor – i el solleric Miquel Arbona i el palmèsà Marià Jaquotot – industrials. D'altra banda, tots quatre foren membres actius de l'esperantisme mallorquí durant totes les etapes i vicissituds polítiques.

A manera de conclusió, hem vist com a partir de la Guerra Civil només a la zona rebel el moviment esperantista en conjunt fou objecte de persecució, sens dubte propiciada per l'ànsia que tenien de destruir aquells moviments que guardaven dintre seu els valors essencials de la contemporaneïtat.

Hem vist que en esclatar la guerra a la zona republicana es va emprar més que

mai l'esperanto tant a la premsa com a la ràdio. Fins i tot el president Companys va parlar d'introduir-lo en l'ensenyament passada la guerra.

Hem vist també que acabada la guerra els esperantistes supervivents van haver d'acceptar els principis del "*movimiento nacional salvador de España*", i que foren expressament vigilats i controlats per les forces de l'ordre, si bé no van poder realitzar cap activitat pròpia durant més d'un decenni i les que feren durant la dècada dels cinquanta estigué sota un control que pesava com una llosa.

Epíleg. Durant la dècada dels seixanta, sota el signe del desenvolupament amb Manuel Fraga Iribarne ocupant la cartera d'Informació i Turisme, alguns joves s'incorporaren al nou esperantisme i juntament amb els supervivents s'adheriren a la política del possibilisme. Així aconseguiren l'any 1961 reemprendre les classes a Palma, després d'estar 25 anys sense fer-ne. El nou col·lectiu esperantista espanyol, conjuntament amb l'esperantisme internacional, en un exercici de violència contra els pro-

pis principis va voler oblidar el passat i l'any 1968 va atorgar la *presidència d'honor* al general Franco en ocasió del congrés universal d'esperanto celebrat aquell any a Madrid<sup>19</sup>. Alguns d'aquells actes van tenir els rars honor i privilegi de comptar amb l'assistència del llavors ministre d'Informació i Turisme Manuel Fraga Iribarne. A més a més de les sessions, les quals tenien un caràcter més o menys científic, si més no relacionades amb la llengua auxiliar internacional o amb afers merament lingüístics, els participants van dedicar part del seu temps a fer algunes excursions. Una d'aquestes es feu al Valle de los Caídos, lloc a on sens dubte més d'un esperantista republicà va ser obligat, en qualitat de presoner de guerra, a treballar de sol a sol, en la dura tasca d'aixecar un indigne mausoleu a favor dels dirigents de la rebel·lió militar. □

Aquesta comunicació va ser presentada a les jornades "Societat, Ideologies i Moviments Socials a les Illes Balears a l'Edat Contemporània", celebrades a Palma el 1995.

<sup>1</sup> Aquesta modalitat de la medicina fou expressament prohibida i els seus practicants, encara que fossin metges qualificats, foren perseguits.

<sup>2</sup> A més a més dels llocs a on es reunien els esperantistes, en els anuaris (*Jarlibro*) hom podia trobar noms i adreces dels delegats de l'associació. A Mallorca n'hi hagué a Palma i a Sóller. A més a més, hi havia subdelegats dedicats a activitats concretes, com per exemple al comerç.

<sup>3</sup> La Última Hora, 16.9.1933, pàgina 2.

<sup>4</sup> Associació per la Cultura de Mallorca, Palma, desembre 1924 i juliol 1925.

<sup>5</sup> D. Ginard, "Sobre l'esperantisme a Mallorca fins a la Guerra Civil", dins la revista Lluç, Palma, 1991, p. 226.

<sup>6</sup> El 1961 es fundà l'Associació Esperantista Balear; el president honorari fou Bernat Rabassa, que segons Marià Jaquotot traduí una carta redactada en esperanto procedent de la Unió Soviètica i per la qual havi-

en empresonat el destinatari; vegeu nota núm. 5.

<sup>7</sup> J. Matas i J. Salom, els cita M. Jaquotot en l'entrevista que concedí a D. Ginard; vegeu nota núm. 5.

<sup>8</sup> Citat per D. Ginard a "Sobre l'esperantisme a Mallorca"; vegeu nota número 5.

<sup>9</sup> U. Lins, La danĝera lingvo ("La llengua perillosa"), Antuèrpia, 1988. En la pàgina 139, vegeu la nota número 13; l'autor cita el número 16 de la revista Popola Fronto, València 1937, p. 2, a on recullen l'amenaça feixista a "tots els membres de les sectes, francmaçons i esperantistes, que serien perseguits com ho foren a Còrdova". Seguidament Ulrich Lins aclareix que "els facciosos cremaren la casa del parlamentari socialista Francisco Azorín pel fet d'haver-s'hi trobat dedins una insígnia esperantista, és a dir una estrella verda de cinc puntes."

<sup>10</sup> Amb relació a la repressió i sobre les persones vegeu: El pasado oculto: Fascismo y violencia en Aragón (1936-1939), Siglo xxi, 1992, i sobre

el col·lectiu esperantista també pot ser útil la lectura d'A. Marco Botella, Analoj de la esperanta movado en Hispanujo ("Anals del moviment esperantista a Espanya"), Saragossa, 1987, p. 329.

<sup>11</sup> Citat per D. Ginard a "Sobre l'esperantisme a Mallorca". Vegeu nota núm. 5. Tot i que hi ha alguns materials documentals que no foren destruïts: per exemple la família de Gabriel Meneu guarda un llibre de visites de la Klubo.

<sup>12</sup> Ulrich Lins, La danĝera lingvo, 1988, p. 138.

<sup>13</sup> N. Fluvià a Cronologia del moviment esperantista català, dins M. Boulton, Zamenhof, Barcelona, 1987, p. 234.

<sup>14</sup> A. Marco Botella Laboristaj Kronikoj ("Cròniques obreres"), Beauville, França, 1996, p. 60.

<sup>15</sup> U. Lins, La danĝera lingvo, p. 138, citació 1; A. Marco Botella a Laboristaj..., p. 64, esmenta entre d'altres Ludwig Renn (pseudònim de d'A. F. Vieth Golssenau) comandant del

Bataló Thaelmann de les Brigades Internacionals com a col·laborador de Popola Fronto de València l'any 1937.

<sup>16</sup> A. Marco Botella, Analoj de la esperanta movado en Hispanujo, p. 338-339.

<sup>17</sup> A. Marco Botella, Analoj de la esperanta movado en Hispanujo, p. 411.

<sup>18</sup> Citat per D. Ginard a "Sobre l'esperantisme a Mallorca"; vegeu nota núm. 5. Marià Jaquotot afirmà que fou B. Rabassa qui traduí la carta procedent de la Unió Soviètica adreçada a Antoni Nadal i que significà el seu immediat empresonament.

<sup>19</sup> També l'Associació Universal d'Esperanto va canviar la seva organització interna després de la Segona Guerra Mundial. Van obviar l'existència de Kataluna Esperantista Federacio i la representativitat dels esperantistes catalanoparlants passà a disposició de la Federació Española de Esperanto, amb seu a Madrid.

## Komencantoj: Naziaj esperantistoj

En 1931 ekagis en Germanio **nazia** organizaĵo sub la nomo *Nationalsozialistischer Deutscher Esperanto-Bund* (Naci-socialista Germana Esperanto-Ligo). Ĉar la ŝtato malpermesis la asocion tiel nomiĝi, tiu devis ali-nomi sin *Neue Deutsche Esperanto-Bewegung* (Nova Germana Esperanto-Movado, NDEB).

Tre baldaŭ la membroj de NDEB **postulis** la eksigon de ĉiuj judaj membroj al la aliaj germanaj esperanto-asocioj kaj precipe al la Germana Esperanto-Asocio (GEA), kiu malakceptis tion. Nur kelkaj lokaj grupoj en Saksio **minacis** pri dismembriĝo, se la respondeculoj de la tut-landa asocio ne eksigis pro tiu malakcepto. La respondeculo pri tiu afero estis Albrecht Naumann.

Tamen, en 1931 nova prezidanto de GEA pli favora al Naumann sub-skribis interkonsenton kun NDEB, kio fakte desegnis la kuniĝon de ambaŭ asocioj sub nova organizaĵo, nome, Germana Esperanto-Fronto. Dum kelka tempo ŝajnis, ke GEA simple sekvis la direkton de NDEB. Eĉ ĉiu ĝia membro devis esprimi, ĉu ŝi aŭ li estas jud-devena aŭ ne. Sed tiu inter-konsento baldaŭ nuliĝis, ĉar rapide estiĝis opiniaj malfacilaĵoj inter membroj de ambaŭ asocioj.

Sekve de tio, NDEB rompis la rilatojn kun GEA kaj petis al ties membraro for-lasi la asocion. Sed por ne starigi **suspektojn**, fine GEA **postulis** en 1935, ke ĝiaj membroj “povas esti nur germanaj sam-nacianoj”.

Tio signifis, ke judoj devis eksigi el la asocio. Se oni pensas tion, eĉ Zamenhof mem devus eksigi, se li tiam estus membro!

Ĉiu-okaze, tiu fia mispaŝo ne utilis por plu vivi en la tiama malpaca Germanio, ĉar la **nazioj** malpermesis en 1936 ĉiujn esperantistajn asociojn ĝuste ĉar, laŭ ilia idearo, la inter-nacia lingvo estas ilo de la judaro kontraŭ la germana nacieco.

Gerard Escuer

*Berlino, Schloßplatz, 10an de majo 1933*



**nazio:** ano de la hitlera movado.

**postuli:** peti, ke iu faru ion.

**minaci:** montri al iu, ke oni intencas fari malbonon.

**suspekto:** kredi, ke iu faras ion malbonan.

L'Associació Catalana d'Esperanto només es manté amb les vostres aportacions



## Fes-te'n soci

Com a soci de KEA rebràs el Kataluna Esperantisto, estaràs al corrent de tots els esdeveniments, tindràs rebaixa als congressos... però sobretot estaràs contribuïnt amb el moviment esperantista a casa nostra.

## Progresantoj: Fidanta al vorto atendas ĝis morto



WIKIPEDIO

Tevfik Esenç (1904 - 1992)  
lasta parolanto de la ubiĥa lingvo

**fidanta:** kredanta iun kaj ties intencon aŭ kapablon.

**interreto:** tut-monda komputila komunikilo.

**mino:** milita ilo subtere aŭ subakve kaŝita por mortigi la kontraŭulojn post ĝia tuŝo aŭ surpaŝo.

**respektive:** laŭorde.

Laŭ la internacia organizaĵo Unesko, en la mondo malaperas po unu lingvo ĉiun duan semajnon. Tiel akra estas la lingva situacio, ke proksimume 50% el la 6000 lingvoj ekzistantaj en la mondo estas endanĝerigitaj kaj turni ties staton estas ege malfacile. Mem-kompreneble, se oni konsideras, ke pli ol 90% el ili eĉ ne aperas en **interreto**. Daŭre, la sama procento el la lingvoj de la aŭstraliaj praloĝantoj jam malaperis.

Tamen, eble iu eŭropano ankoraŭ konsideras, ke tiaj aferoj ne koncernas lin, ke la morto trafas nur afrikajn aŭ amerikajn lingvojn. Nu, krom la granda perdo por la tuta homaro, kiun signifas ne plua ekzisto de eĉ la malplej parolata lingvo, pro ties kulturaj valoroj kaj scioj, oni ja povas diri, ke tio okazas ankaŭ en Eŭropo.

Bedaŭrinde estas pluraj ekzemploj pri lingvoj jam ne plu vivantaj ĉe ni. Veraj trezoroj, kiel ekzemple, la gota, ĝermanida lingvo de la iamaj gotoj, kiuj regis Iberion, Okcitanion kaj parton de Italio dum la 6a jc. Ĝi estis skribata per grekecaj literoj kaj verŝajne supervivis en Krimeo ĝis la 18a jc.

Ĝuste en tiu jarcento mortis ankaŭ la polaba, la plej okcidenta slava lingvo parolata en la germana regiono Vendlando. Kaj en 1777 mortis la lasta flua parolanto de la kornvala, kelta lingvo, kiun provas revivigi kelkaj centoj da homoj en la samnoma duoninsulo (en Britio).

Fine de la 19a jc mortis la norna kaj la dalmata. La unua estis ĝermanida lingvo alportita de norvegaj vikingoj en Ŝetlandon kaj Orkadojn (skotaj insularoj), el kiu restis tre malmulte. La dua estis latinida lingvo parolata en kelkaj insuloj kaj en la samnoma marbordo, inter Istrio kaj Montenegro. Ĝi malaperis en 1898, kiam ĝia lasta parolanto loĝanta en la kroata insulo *Krk* mortis, oni-dire, kiam li surpaŝis **minon**.

En 1974 mortis la lasta denaska parolanto de la manksa, kelta lingvo ankoraŭ nun parolata kiel dua lingvo en tiu insulo situanta en la Irlanda maro. Male, la ŝuadita jam ne plu restas parolata ekde 1977, kiam mortis ĝia lasta parolanto, la verkisto Armand Lunel. Tiu lingvo, tre proksima al la okcitana, estis uzata de la juda komunumo loĝinta en Provenco. Tamen ĝi estis skribata –kiel same ĉiuj judaj lingvoj– per hebreaĵ literoj.

Sed tiu sanga elsekiĝo daŭras, pluen, sen interrompo. Ĉi-momente jam estas malaperontaj la livona kaj la votia, ambaŭ uralaj (finn-ugraj) lingvoj havantaj ne pli ol 50 parolantojn loĝantaj en Latvio kaj okcidente de Sankt-Peterburgo (Rusio), **respektive**. Ankaŭ aliaj judaj lingvoj estas en eĉ pli akra stato. Temas pri la jud-itala, la jevanika (jud-greka) kaj la krimĉaka (jud-tatara).

Ĉiuokaze, perdo de lingvo estas perdo de plureco, de mond-rigardo, de solvo al problemo, de scioj ankoraŭ ne esploritaj, kaj ne gravas, ĉu tio okazas en Nov-Zelando, ĉu en Gronlando.

Gerard Escuer

“Estu puraj, parolu france”, murskribaĵo en la eksa lerneja korto de Aiguatèbia (Conflent)





# Mezlerneja esploralaboro pri esperanto

Hektor Alos i Font

*Delonge mezlernejaj instruistoj al kutimiĝis al ricevo de longaj esplor-laboroj fare de siaj lernantoj. La ĝeneraliĝo de Interreto senmezure faciligis la ŝveligon de la laboraĵoj, ĉar pli ol iam ajn antaŭe facilas per kelkaj musklakoj reprodukti enormajn kvantojn da teksto. En miaj tempoj, kaj en tiuj de antaŭaj generacioj, la afero estis iom pli pena, sed ankaŭ ne malfacila: sufiĉis iri en bibliotekon kaj kopiadi ĉion diritan de diversaj enciklopedioj kaj pli-malpli fakan literaturon kaj oni atingis dekojn, eĉ kelkcentojn, da paĝoj. Lernantoj foje konkuris inter si pri la longeco de la taskoj, sed la esenca parto de la laboro – la kritika analizo de la materialo – ofte postrestis. Jen la impresoj, kiam oni legas la 358-paĝan verkon de Antonio Marco Botella Esperanto en Katalunio: apenaŭ eblas imagi pli suprajn prezenton de la interesa, faktoplena kaj multflanka historio de la esperanto-movado en Katalunio.*

**S**ame kiel li faris en sia pli longa kaj same senenhava *Analoj de la esperanto-movado en Hispanio*, lernanto Antonio Marco kopiis unu post la alia oscedige longajn raportojn pri preskaŭ ĉiuj esperanto-aranĝoj okazintaj en nia lando ĝis la jubilea jaro 1987. Se vi volas scii pri la menuo de la bankedoj aŭ la koloro de la vestaĵoj de la reĝinoj de la Floraj Ludoj, jen la libro por vi: pri tio ĝi estas preskaŭ nesuperebla. Sed se vi eventuale interesiĝas pri grava diskuto okazinta en unu el tiuj kongresoj, bedaŭrinde vi trovos preskaŭ nenion en la verko. Krome, se vi eventuale interesiĝas pri aferoj ekster la kongresa kadro, vane vi serĉos preskaŭ ĉion ajn.

Ĉu ekzemple vi emus ion legi pri la fondiĝo de Kataluna Esperanto-Junularo aŭ la eldono de ĝia iama revuo *Kata Luno*? Ne, tion vi ne trovos en *Esperanto en Katalunio*. Ankaŭ ne pri la aktivado de junaj katalunaj esperantistoj en internaciaj kongresoj – sed ankaŭ ne de katalunaj esperantistoj ie ajn eksterlande, kvankam ja okazis gravaj disputoj, kiuj helpus ĵeti multe da lumo en kelkaj aspektoj de la ne malofte polemik-plena historio de la katalunia esperanto-movado. Ekzemple, la salutado de katalunoj dum la unuaj Universalaj Kongresoj.

Sed Antonio Marco preferas laŭeble kaŝi ĉiajn disputojn... kaj per tio li flankenpuŝas, eĉ kaŝas, esencajn faktojn, kiuj malhelpas kompreni la okazaĵojn.

Male, li supermezure aldonas adjektivojn (i.a. en la librofinaj notoj entenantaj biografietojn de la plej elstaraj aktivuloj) – sed al adjektivoj mankas ofte konkreta subteno per faktoj.

Ekzemple, nenion vi trovos pri la ŝtorma KEA-sembleo okazinta en 1987, kiu praktike rezultigis profundan skismon en nia movado. Eblas legi pri la transpreno de la HEF-estraro de katalunaj aktivuloj kaj pri la fonda de “laborista” Kultura Asocio Esperantista, sed ĉia analizo forestas.

## Ŝokaj neglektoj

Unu el la multe multaj ŝokaj neglektoj de la libro troveblas en la mejloŝtona kongreso de Vinaròs en 1928, kiun la aŭtoro mem taksas “vere malfacila” – kredeble, ĉar temus pri herkula tasko senbrue paŝi sur la “agreŝman intruzisman politikon” de la diktaturo de Primo de Rivera kontraŭ Kataluna Esperantista Federacio. Ni ekscias, ke “la 22an de aŭgusto, t.e. du semajnojn antaŭ la kongreso programita por okazigi ĝin en Vinaroz [Vinaròs] (Castellón [Castelló]), la prezidanto de Kataluna Esperantista Federacio, s-ro Dalmau, devis demisii post ricevo de ordono de la Barcelona Provincestro s-ro [generalulo] Milán [Milans] del Bosch, kiu sugestis al li ŝanĝojn en la statuto de KEF kaj ĝian aliĝon al Hispana Esperanto-Asocio, kaj oficiale fermis lian profesion laborejon Liceo Dalmau”. La aŭtoro forgesas

mencii, ke Delfi Dalmau (misskribita tra la tuta libro kiel “Delfi”, sen supersigno) ricevis ankaŭ fortegan monpunon. En aliaj verkoj eblas legi pli precize, kiujn ŝanĝojn “sugestis” generalo Milans del Bosch: la aŭtoro taksis negrave detaligi ilin, kvankam en la sekvaj sep paĝoj da kongresa raporto li juĝas oportune atenti eĉ pri la “ĉarma Reĝino kaj Korteganinoj” de la Floraj Ludoj. Li fakte eĉ konsideras neoportune mencii la decidon malfondi KEF atende de pli favoraj politikaj cirkonstancoj... kio vere igas la sekvajn paĝojn enigmoplenaj por nekonintoj de la okazaĵoj. Kaj, tute kompreneble, li eĉ ne rimarkigas, ke en la enmiksiĝo de la armeaj aŭtoritatoj en la aferojn de KEF eĉ lerneja-knabo povas fortegege suspekti pri denuncio de alitendaraj esperantistoj. La termino mem “sugesti” en rilato al ordono de generalo dum armea diktaturo, akompane de altega monpuno kaj fermo de entrepreno, estas ekstreme ŝoka, des pli kiam ĝin skribas konata kontraŭulo de alia “sugestema” armea diktaturo.

Jen okazo inter senfino da aliaj. Kiel leganto mi ekzemple aparte elreviĝis, trovinte nur tri paĝojn pri la ege atentinda rolo de esperanto dum la milito. Ĉar la aŭtoro partoprenis tiun periodon ankaŭ kiel esperantisto, tio estas ege bedaŭrinda: jen maltrafita okazo ion interesan kaj novan diri.

La citaĵo montras ankaŭ alian ege malfortan flankon de la libro: ĉiupaĝe oni



Antonio Marco Botella.  
*Esperanto en Katalunio.*  
 Barcelona Esperanto-Centro,  
 Barcelono, 2005. 358 p. ISBN 84-933700-1-0

renkontas mise skribitajn proprajn nomojn. Plej ofte ili aperas en ŝajn-kataluna, t.e. en iu kataluna lingvo kun hispana ortografio (i.a. preskaŭ neniu supersigno ĝustas). Plurloke misinfluo de la franca ankaŭ evidentiĝas (i.a. ĉe amasoj da “Joseph”). Simile okazas kun loknomoj (“Sardanyola”, “Sant Cugat del Vallés” ktp. ktp.); valenciaj urboj ial aperas nur en la hispana (eĉ en “Vinaròs”, kie nur la kataluna formo estas delonge ofici-ala); ni ekscias pri grupoj kiel “Joven-tut Terrassence”... Neniu skribkapabla katalunlingvano reviziis la tekston. Kaj bedaŭrinde oftas eraroj ankaŭ en esperanto. Kaj tajperaroj abundas.

Tiuj formalaj flankoj denove memorigas pri mezlernejaj laboraĵoj, kie lingvo kaj ortografio nuntempe lamas preskaŭ ĉiupaŝe. Tio vekas iom da malagrablo, sed ĉiuokaze temas pri la plena manko de analizo, kio fine igas la verkon ne libro pri historio, sed tede longa kongresa anekdotaro. Eĉ ne por momento la aŭtoro haltas por iom vidi kiom kaj kiaj estis esperantistoj: kiel ili aliĝis al esperanto?; kiamaniere ĝi disvastiĝis?; inter kiuj soci-tavoloj? Ni eĉ ne scias, konkrete kiuj bultenoj aperis, kiom longe, dum kiom da numeroj; kiuj grupoj fondiĝis, kiom longe ili aktivis, en kio konsistis ilia agado, kun kiuj kolektivoj (esperantaj aŭ ne) ili rilatis kaj kiamaniere. Ni preterpase ekscias, ke en 1930 fondiĝis PUIL (Proleta Esperantista Unio de Iber-Amerikaj Landoj), “anarkistema [tiele] esperantista asocio”, kaj ni poste scias, ke en 1936 ekzistas iu alia asocio ILES (Iberia Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj) eldonanta bultenon de “anarkista [tiele] tendenco” kaj eĉ ke ekzistas diferencoj inter ambaŭ, tamen mankas ĉia klarigo pri ili. Fakte, ĉar ĝi ne kongresis, la laborista esperantomovado estas tre neglektita. La aŭtoro ŝajne ne scias, ke ekz. ekzistas doktora tezo pri la katalunia laborista gazetaro antaŭmilita, kiu pritraktas ankaŭ la esperanto-gazetaron. Fakte multloke leviĝas fortaj suspektoj, ke la aŭtoro malbone konas la rimarkinde multajn esplorojn pri la esperanto-movado en Katalunio (i.a. de Fluvia, Margais, Solé Camardons kaj Amouroux). La graveco de diversaj esperantistoj en la kataluna kulturo aŭ socio estas nerimarkita: kiel eblas kom-

preni la rolon de Pujulà i Vallès, se oni ne konas lian ekstermovadan gravecon? Nur Fernández Jurado estas iom priatentita ĉi-flanke (en librofina noto), sed ne Pujulà i Vallès, Joan Amades, Delfi Dalmau, Jaume Viladoms, Gabriel Mora, Manuel de Seabra k.a.

### Terminaro

Laste, sed ne balaste, pritraktindas la elekto de la terminaro kaj la politikaj sintenoj de la aŭtoro.

Estas nenio oponinda al tio, ke homo kun klara politika vidpunkto verku libron pri historio. Klare la verkoj de ekz. Fluvia, Margais, Poblet kaj Solé Camardons malkaŝe evidentiĝas simpation por la katalunisma tendaro en la loka esperanto-movado. Tamen ili ĉiuj travideble listigas faktojn, analizas ilin kaj eltiras konkludojn, kiujn eĉ ali-opiniantoj povas profite uzi. Ĉe Antonio Marco tio ne okazas: ni jam sufiĉe montris, ke li silentigas esencajn faktojn tra la tuta verko – kio ne plaĉas, tion prefere ne diri. Kaj tio ne nepre okazas pro ideologio, sed ŝajne pro erara hontemo pri tio, ke Esperantio ne estas la sopirata fabellando, kie ŝafoj sin paŝtas apud leonoj, sed ke evidente en ĝi estiĝas konfliktoj, kiel en ĉiuj homaj kolektivoj.

Tamen ideologia estas parto de la terminaro, kiun la aŭtoro uzas. Li dividas la esperanto-movadon en tri tendencojn, kiujn li nomas “neŭtraluloj”, “katalun-naciistoj” kaj “proletoj” aŭ “laboristoj”. La du lastajn grupojn li foje kunigas kiel “progresemlulojn”. La divido estas sendube prava kvankam ĉiam, ankaŭ feliĉe nuntempe, troviĝis homoj partoprenantaj en pluraj tendaroj. La elekto de la terminoj ne estas sentradicia en esperanto, sed mi estus preferinta pli kuraĝan elekton: taksu “neŭtrala” iun ajn grupon en ideologia disputo estas grava malĝustaĵo (eĉ maljustaĵo). Temas pri konata taktiko alnomi sin “neŭtrala” aŭ “centra” por arogi al si pli grandan reprezentigon, eĉ preparolan rajton. Bedaŭrinde la esperantistaj “neŭtraluloj” ofte staris tute malneŭtrale, kaj ĝuste el iliaj vicoj ni devas nombri la arme-amikajn denuncistojn, kiuj i.a. ekziligis Pujulà i Vallès kaj persekutis Delfi Dalmau.

Fakte, al tiu ĉi tendaro povus eventuale eĉ pli konveni la adjektivo “naciistoj”, kiun la aŭtoro uzas por la katalunistoj. Ĉar bedaŭrinde temas pri nacilingvismo: la termino “naciismo” (aŭ ties malnoviĝinta sinonimo “nacionalismo”) estas internacie uzata por fidoktrino taksanta superecon de unu popolo super aliaj. Tiu ĉi signifo ekzistis ankaŭ en la hispana kaj kataluna lingvoj, sed iam parto de la katalunisma movado deziris pli klare diferencigi sin de la “regionistoj” kaj elektis al si la nomon “naciistoj”, ĉar la pli rekta “sendependistoj” estus tiam neakceptebla kaj eĉ jure persekutebla. “Naciismo”, en la internacia signifo de la vorto, estas apenaŭ trovebla en Katalunio, dum ĝi, bedaŭrinde, estis grava trajto de la hispania dekstro (kaj spuroj el tio restas evidentaj ankaŭ nuntempe). Ĉiuokaze, kvankam “naciismo” kaj “naciisto” estis uzataj kun nacilingva signifo fare de kelkaj katalunaj esperantistoj (i.a. de Joan Amades), la terminoj ne enradikiĝis en la nuntempaj katalunaj esperantistoj (almenaŭ en la tiu-tendaraj), kaj ili estas ekstreme erarigaj por eksterlandaj esperantistoj. “Katalunistoj” estas tute taŭga kaj sendube preferinda vorto por alnomi tiun grupon.

Tamen tiu ĉi detala kritiko pri la uzita terminaro ne miskomprenigu mian opinion de la libro. En la lastaj jaroj unu el miaj taskoj en la movado konsistis en la helpado de mezlernejanoj en la fina jaro de la gimnazio pri esperanto-rilataj esplor-laboroj. Ili estas ofte tajloritaj laŭ simila modelo, en kiu oni klarigas pri la deveno de la planlingvoj, la historio de esperanto, ties lingva strukturo, ĝiaj kialoj kaj fine ofte oni enkete iom esploras pri la sinteno de manpleno da aktivuloj pri diversaj temoj. Kelkaj esploroj fokusiĝas plimulte pri la ideologio de la movado, dum aliaj pri la historio. Kelkaj laboraĵoj estas pli priskribaj, aliaj pli analizaj, sed kutime ĉiuj, kiuj elektis esperanton kiel temon kaj kontaktis Katalunan Esperanto-Asocion por helpo, montriĝis seriozaj kaj laboremaj. Eble tial du el la deko da prezentitaj taskoj, kiujn mi legis, mi aljuĝus kun pli bona noto ol la ampleksa mezlerneja esploro-laboro de Antonio Marco. □

## Interreta rubriko

Laŝtatempe oni povas trovi en la reta portalo de Pola Radio servon, kiu disponigas valoregan didaktikan servon al la esperantistaro. Pluraj raportoj legataj dum la radioelsendo aperas ankaŭ laŭ skriba formo en ties retpaĝaro, sed, aldone, Pola Radio disponigas ĝian son-enhavon registritan laŭ MP3-formato. Tio ebligas uzi la tekstojn didaktike, ĉar lernantoj de esperanto povas samtempe vidi la skriban raporton surekrane kaj auskulti ĝin. Ĉar la prononco de la parolistoj de tiu radiostacio estas konsiderata kiel vere modela, tio devas efiki, por ke lernantoj – kaj foje veteranoj – atingu parolan perfektecon. En la tekstoj kiuj havas parolan version oni trovas ligilon “Audio”, kiu aŭtomate malfermas la arĥivon MP3.

La retadreso de Pola Radio estas:  
[polskieradio.pl/polonia/eo/](http://polskieradio.pl/polonia/eo/)

Jen imitinda agado: Internacia skipo de profesiaj tradukistoj pretigis tradukon de la retpaĝaro de la urbo Montpeliero al la lingvoj angla, araba, ĉina, franca, germana, hebrea, hispana, kataluna kaj

okcitana, uzante esperanton kiel pontlingvon. En la skipo partoprenis Ferriol Macip kaj Lluís Garcia. La brilan rezulton oni povas konstati ĉe:  
[eo.montpellier.fr](http://eo.montpellier.fr) (esperante)  
[ca.montpellier.fr](http://ca.montpellier.fr) (katalune)  
[oc.montpellier.fr](http://oc.montpellier.fr) (okcitane)

Daŭras interesplenaj eksperimentoj pri esperanta parolsintezado. Avantaj spertuloj povas informiĝi kaj partopreni en la provoj en:  
[users.pandora.be/raymond.gerard/esperanto/sintezo.htm](http://users.pandora.be/raymond.gerard/esperanto/sintezo.htm)

Ekzistas Yahoo-grupo pri tiuj provoj:  
[groups.yahoo.com/group/Parolu/](http://groups.yahoo.com/group/Parolu/)

La nova fenomeno, la blogoj, ankaŭ montras la viglecon de nia lingvo en la reto. Jam pasintjare *Libera Folio* menciis 3000 blogojn en esperanto, pli ol la ekzistantaj en la sveda au en la fina lingvoj. Interesa paĝo, kiu aperigas elektitajn esperantajn artikolojn el aliaj blogoj, troveblas en:  
[e-planedo.kerno.org](http://e-planedo.kerno.org)

Jen tri rekomendindaj esperantlingvaj blogoj de iberianoj:

Pere Quintana:  
[bits.quintanasegui.com/categories/other-languages/eo/](http://bits.quintanasegui.com/categories/other-languages/eo/)

Tonyo del Barrio:  
[personal.telefonica.terra.es/web/tdb/blogo.htm](http://personal.telefonica.terra.es/web/tdb/blogo.htm)


Jorge Camacho:  
[jorgecice.blogspot.com/](http://jorgecice.blogspot.com/)

Interesplenaj artikoloj pri budhisma kulturo aperas en la paĝaro de Budhana Esperantista Ligo, en:  
[www.esperanto.us/budhana.html](http://www.esperanto.us/budhana.html)

Ĉio pri la Akademio de Esperanto troveblas en ĝia paĝo:  
[www.akademio-de-esperanto.org](http://www.akademio-de-esperanto.org)

Darío Rodríguez

## Ni laste ricevis en la libroservo



### Plena manlibro de Esperanta gramatiko

Bertilo Wennergren. ELNA, 2005. 696 p. 24 cm. Bindita. 30 eŭroj. La plej populara kaj kompleta nuntempa gramatiko: praktika lernilo, ne teoria verko por lingvistoj.

### La Zamenhof-strato

Roman Dobrzyński. Varpas, 2005 (dua eldono). 288 p. 21 cm. Bindita. 20 eŭroj. Interparoloj kun la nepo de la kreinto de esperanto.

### Sed homoj kun homoj



(historio de la Universaliaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005)

Ziko Marcus Sikosek. UEA, 2005. 197 p. Bindita. 30 eŭroj. Ilustrita rigardo super la ĉefa kaj plej granda regula renkontiĝo de esperantistoj.

### Mil unuaj vortoj en Esperanto.

Heather Amery. Trad. Edmund Grimley. EAB, 2004. 63 p. 30 cm. 15 eŭroj. Nova eldono de bele ilustrita vortaro por infanoj de “ĉiuj aĝoj”.

### Vojaĝo en Esperantolando

Boris Kolker. UEA, 2002. 279 p. 21 cm. 18 eŭroj. Vendo-furoro en Esperantio.




### Jomo slavumas

Jomo Vinilkosmo, 2006. 18 eŭroj. Lasta 24-kanzona KD de unu el la plej popularaj esperanto-kantistoj.

### La aventuroj de Pinokjo

C. Collodi. Trad. J. Hor-

vath. FEL, 2003. 156 p. 21 cm. 9 eŭroj. Mondfama fabelo en verda lingvo.



### Internacie kuiri

M. Becker-Meisberger, FEL, 2000. 184 p. 20,5 cm. 9 eŭroj. Reeldono de la plej fama kuirlibro en esperanto.

# El verda vivo ĵurnalista

Gerard Escuer



Eble tiu sinsekvo de okazintaĵoj donis al la aŭtoro ties skeptikan karakteron tiel utilan por ĵurnalisto aŭ por esperantisto, kiu neniam kabeos. Tamen, la kontrasto inter la partopreno en la esperanta-movado kaj la ĉiutaga vivo implicite iĝos evidenta. En la adolesko, la katolika seminario aperas kvazaŭ prizono rilate la liberalan etoson de la esperantaj kongresoj.

**K**onatiĝi kun Stefan Maul sendube ja estus interesa afero. Rigardante lian longan karier-tabelon iu ajn konkludos, ke li estas ne elĉerpebla fonto de travivaĵoj kaj scioj: ĵurnalisto, membro de Akademio de Esperanto kaj Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino, fondinto kaj longe la ĉefa motoro de la internacia magazino *Monato*, verkisto de eseoj, manlibroj, i.a. Tamen, same kiel ĉiu ajn esperantisto, malantaŭ tiu impona kolekto da honoraĵoj iam estis favoraj kondiĉoj, pro kiuj la verda afekcio ekjukis.

La verko de Stefan Maul, titolita “El verva vivo ĵurnalisma”, ebligas trairi lian vivon per rememoroj, okazintaĵoj kaj spertoj, de lia infanaĝo ĝis nun, kaj samtempe kompreni kial kaj kiel li esence iĝis esperantisto kaj ĵurnalisto. Ne strikte temas pri membiografio, ĉar laŭ lia modesta aserto, “tiom grava mi ne estas”. Nur pri kolekto da faktoj verkitaĵ preskaŭ kiel gazetara raporto ĵurnalisma. Tiu stilo ne forkaptos la atenton de la legonto, kiu ja ekde la unuaj impresoj estos engaĝita pri la legado.

Tiasence, ege interese estas legi pri la longa marŝado, kiun lia tuta familio devis efektivigi, forlasinte la hejmon en Kroatio pro la dua mondmilito. La leganto baldaŭ komprenos, ke ne temas pri simpla anekdoto inda por rakontadi dum familiaj altabliĝoj. Ĝi estas vera turnopunkto al vico de misfortunoj kaj sinkado. Ekde la rekomenco en Bavario, la vivo ne estos la samo. Sekve de tia malfacila infan-aĝo, la junan Stefan obsedos la deziro iĝi katolika pastro, sed tio montiĝos komplika celo, ĉar familia sekreto kaj akcidento kun esperantistino malebligis tiun revon.

Per la libro, la legonto ankaŭ sciiĝos pri katolikaj rondoj, ĵurnalismaj medioj, aspektoj de la esperanta movado, kaj pri la projektoj de Stefan Maul, interalie la naskiĝo de la gazeto *Monato*. Sed, kio plej gravas en la libro estas lia sinteno pri la esperantismo. Laŭ Maul, la ĉefa kaŭzo de tio, pro kio la internacia lingvo allogas novajn homojn malgraŭ ĝia eventuala fina malvenko estas la valoroj pri justeco ligitaj kun la movado. Tial, la esperantismo estis por la aŭtoro elirejo de la maljusta kaj netolerema socio. Sed memorigas, ke en la enkonduko, li mem elvokas sian sufiĉan “distanciĝemon” por ne laciĝi de la movado.

Bedaŭrinde tiaj demandoj pri la propra esperantisteco ne estas eksplicitaj dum la rakonto de lia vivo, kvankam lia ekzemplo starigas tiajn pripensojn. Rilate al tio, eble mankas pli rekta opinio, forĝita de la propraj spertoj, pri la evoluo de la movado ol simplaj impresoj pri aranĝoj, novaj interkonatiĝoj per esperanto aŭ kursoj prizorgitaj de la aŭtoro. Plej eble lia vidpunkto kiel ĵurnalisto ja estus interesa.

Ĉu tiel aŭ iel alie, lia laboro, jen kiel ĵurnalisto, jen kiel movadano, jen ambaŭ aferoj kune, rezultis fruktodona. Ekzemplo de tio estas la jena mencio pri la utilo de esperanto: “Dum miaj vojaĝoj [...] kiel ĵurnalisto, [...] [danke al la konfido de la vizititaj esperantistoj, mi] eksciis multe pli ol neesperantista germana ĵurnalisto”. Do, ĉu nur pro la sperto de la aŭtoro, ĉu pro ties skeptika vidpunkto aŭ simple pro la atentokaptaj rakontoj, la legado de ĉi tiu libro ja estas konsilinda al tiu, aktivanta en la esperanta movado kaj al tiu, deziranta starigi novajn projektojn. □



Stefan Maul. *El verva vivo ĵurnalista*. FEL, Antverpeno, 2005. 269 paĝoj. 18 eŭroj